

Seleco



Pres-organo de:
Astura Esperanta-Asocio



Numero 85

Julio 2010



2010: JAKOBA JARO



PILGRIMOJ AL KOMPOSTELO



Astura Esperanta-Asocio

Sidejo: strato Tomás y Valiente, 1 -2ª eta o
33201-GIJÓN (ASTURIO-HISPANIO)

Interret-pa o: <http://uica.info/esperanto>

Retadreso: asturias@telecable.es
<mailto:esperanto@uica.info>

Astura Esperanto-Asocio estas esperantista rondo kiu plenumas sian rolon favore al la disvastigado de la **Internacia Lingvo** unualoke en nia urbo, Gijón, kaj ankaŭ, le eble, en tiuj partoj de la Asturia regiono, kie ne ekzistas lokaj grupoj de **Esperanto**.

Nia agado disvolvi as kadre de: **Cátedra JOVELLANOS de Extensión Universitaria**

<u>Enhavo</u>	<u>Pa o</u>
ASTURA ESPERANTA ASOCIO.- Dumjara vivo de la E-rondo	3-8
Informoj pri Esperanto	9-10
Historio de AEA en HELECO	11-13
2010: Jakoba jaro.- Kompostelo kaj ties pilgrim-vojo	14
Apostolo Sankta Jakobo.- La legendo	15
Apostolo Sankta Jakobo.- La historio	16-17
Prisciliano	18-19
Asturia Regno	20
Kompostelo Jakoba urbo	21
Sankta Jakobo Ma ro-bu isto	22-23
La Vojo al Kompostelo kaj ties pilgrimintoj	24-25
Konstru-arto apud la Vojo	26-27
La gardistoj de la Vojo	28
Pilgrim-dekadenco	29
La nuntempa pilgrimado	30-31
 iuj vojoj kondukas al Kompostelo	32-33
La anser-ludo kaj la Jakoba Vojo	34
Recenzo de verkoj pri la Jakoba pilgrim-vojo al Kompostelo	35-38
Esperanto kaj tradukado	39-42
Esperanto: la fina venko	43-46
Delikata vango-frapo de Brazilo al la mondo	47-48
Kuirante kun Pilar	49
Poezia angulo	50
Irena Sendlerova	51
Eta moko pri Mezepoko	52

La enhavo de la tekstoj de i-tiu revuo ne esprimas oficialan opinion de **Astura Esperanto-Asocio**: pri ili respondecas la verkintoj mem.

Le a Registro 0/319/85



Astura Esperanta Asocio

DUMJARA VIVO DE LA E-RONDO



Pasis preska unu jaro ekde la publikigo de la anta a numero de i tiu revuo. i estis speciala, centpa a numero, efe dedi ita al la raportado pri la cent-jara historio de la esperantismo en Gijón kaj en Asturio. De tiam ni publikigis anka tri numerojn de la **Informilo** de nia E-grupo. Tiu informilo, same kiel la revuo mem, estas prezentata en nia ret-pa o, adreso:

<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/>

En la raportado de la anta a jara periodo ni jam informis pri la e o kiun nia Centjaro havis en la urba kaj provinca presaro. Restas al ni nur mencii la intiman celebradon kiun faris la geesperantistoj de Asturio. La gesamideanoj de Gijón kaj Avilés renkonti is la 29an de a gusto por partopreni fratan vesperman on en la bieno de iu membro de **AEA**, en kampara medio ne malproksime de Gijón. Anta la festeno, la Prezidanto de **Astura Esperanta Asocio**, Carlos E. Carleos, legis salutemesa on substrekante la neceson da re laboradi por la disvastigado de la Internacia Lingvo en mondo kie la malfacila o, e se nuntempe ne estas tiel gravaj kiel en pasintaj epokoj, tamen la cirkonstancoj estas sufi e kontra aj al la ideoj kaj projektoj kiel ties de nia esperantista celo.

Jen ia teksto:

Geamikoj, gesinjoroj: Ni dankas vin pro veni celebri kun ni la unuan jarcenton de Astura Esperanta Asocio. Ni memoru anka pri tiuj sam-

ideanoj kiuj akompanis nin en multaj karaj okazoj, sed ne povas esti hodia inter ni.

La la homa temposkalo, unu jarcento povas esti longa a mallonga periodo. La la lingva historio, i estas nur momento, kaj tial, ni konsideru nian karan Esperanton ankora kreskanta kreita o, kiu maturi as kune kun ni mem. Nun estas malfacila tempo por Esperanto. Ne por la esperantistoj mem, ar jam malproksimas la dan eraj tempoj de Hitlero, Stalino kaj aliaj tiranoj. Nun estas malfacila tempo por Esperanto ar plej multaj homoj opinias ke jam ekzistas internacia lingvo kun plena rajto: la angla. Vi jam bone konas la aferon kaj la avanta ojn kaj malavanta ojn de amba solvoj de la lingva problemoj; do, mi ne da rigu pri tio.

Sed kvankam iuj opinias ke la historio jam atingis sian finon, inter la esperantistoj ankora da ras la idealoj de paco, ne traleco kaj respekto al iu homo kaj ies kulturo. Nia komunumo ankora konservas valorajn proprajn trajtojn: Don Harlow pensas ke la kvanto de esperantistoj restas kaj plu restos proksimume konstanta; Jorge Camacho opinias ke Esperanto ebligas vere altkvalitan komunikadon, malkiel la naciaj lingvoj...

Kiel ajn estas via motivo por uzi a pledi Esperanton, ni kune oju i tiun centjari on kiel da ron de humana idealo. Por aliaj cent jaroj de Esperantismo en Asturujo, DANKON AL IUJ!

Seleco

Pres-organo de Astura Esperanta-Asocio



A.E.A.-informilo

Numero 6 - Aŭgusto 2009

2009: Centjaro de Esperanto en Gijón kaj Asturio

En tiu numero de la informilo, ni prezentas la rezultojn de la centjara festo de Esperanto en Gijón kaj Asturio. Ni raportas pri la multaj eventoj kiuj okazis, inkluzive de koncertoj, teatraj prezentadoj, kaj diskutoj. Ni anka mencias la partoprenon de multaj esperantistoj el diversaj landoj. La artikoloj estas ilustritaj per fotoj de la eventoj kaj de la partoprenantoj.

A.E.A.-informilo

Numero 5 - Novembro 2009

Niaj kursoj, niaj kunvenoj...

En tiu numero, ni raportas pri la rezultoj de niaj kursoj kaj kunvenoj. Ni mencias la partoprenon de multaj homoj kaj la sukcesojn kiuj estis atingitaj. Ni anka mencias la planojn por la estonteco de nia grupo. La artikolo estas ilustritaj per fotoj de la kursoj kaj kunvenoj.

A.E.A.-informilo

Numero 4 - Aprilo 2010

Esperantista festo 2009

En tiu numero, ni raportas pri la rezultoj de la Esperantista festo 2009. Ni mencias la partoprenon de multaj homoj kaj la sukcesojn kiuj estis atingitaj. Ni anka mencias la planojn por la estonteco de nia grupo. La artikolo estas ilustritaj per fotoj de la festo.

Lastaj eldonajoj de Astura Esperanta Asocio



Festante la Centjaron de Astura Esperanta Asocio

Poste oni efektiviĝis la transdonon, al la eestantaj geesperantistoj, de la ekzempleroj de la speciala numero de la revuo Heleco, kiu estas videbla en la ret-adreso:

<http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/heleco/84/h84.html>

Tiam ne estis la momento eklegi ĝin, sed iuj povis ĝin trafoliumi kaj trarigardi la multajn fotografa ojn. La jarcenta historio kiun tiu revuonumero rakontas plenas je bildoj, efefotoj, kaj grandparto el ili apartenas al la lastaj periodoj, t.e. al epoko kiun travivis multaj el la eestantoj, kiuj povis sin senti, iamaniere, protagonistoj de la historio rakontata de tiu bulteno.

Poste estis la vespermanado en la amikeca kaj frateca etoso de la esperantistaj kunvenoj. Tial ke la bona vetero de la sezono permesis tion, la manado okazis ekstere, kun la tipe bela pejzaĝo de la astura kamparo.

Pli ampleksa informo pri tiu akto, krome kun fotografa o, estas videbla en nia retpaĝo, adreso: <http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/zt/centjaro/festante.html>

Kiel sciante, la celo de ĉiu esperantista organiza o estas la disvastigado de la internacia lingvo, kaj por atingi tiun celon la ĉefa tasko estas la organizado de kursoj de Esperanto.

Por la lernojaro 2009-2010 nia E-grupo havis planojn eble tro ambiciaj. Unue estis la projekto de niaj universitataj profesoroj, María José Álvarez Faedo kaj Carlos E. Carleos organizi universitatajn kursojn de Esperanto, unu en Oviedo kaj alia en Gijón, similaj al tiu okazinta en Oviedo antaŭ pluraj jaroj. Sed tiuj kursoj ne okazis tial

ke neniu universitata student(in)o interesiĝis pri la afero.

Krom tio, **Astura Esperanta Asocio** planis E-kurson okazeblan en sia propra ejo, por ĉiu ajn tipo de publiko. Sed, ankaŭ ĉi tiu ne povis okazi pro manko gelnantoj.

Por la varbado de novaj esperantistoj pere de lingvo-instruado estas ĉi tiu problemo kiun ĉi nun ni ne sukcesis solvi. Temas pri la propagando, la publika informado... Ni intencis alveni al la publiko pere de la presaro. Al ĉiuj amasinformiloj de Gijón kaj de Oviedo, ni sendis, kun la anonco de la nova kurso, artikolon argumentante favore al Esperanto. Espereble, en urbo kia Gijón, kun pli ol 250.000 enlojantoj, povus ekzisti kelkaj personoj kiuj interesiĝus pri nia afero. Sed la problemo estis ke neniu el la amaskomunikiloj publikigis nian tekston.

Krom la malfacila o en la varbado de novaj geesperantistoj, estas la problemo de la malapero de la antikvaj gesamideanoj. En la periodo kiun ni priraportas ni devas bedaŭri la perdon de aktivulo de nia movado kia Julio Argüelles. La 30an de pasinta monato oktobro forpasis tiu samideano. Dum kelkaj jardekoj li membris kaj aktivadis en la organiza o de la esperantista movado en Gijón. Li partoprenis en multaj kongresoj de Esperanto, ĉefe en la Universalaj, kaj raportadis pri tiuj forumoj por la publikigo en ĉi tiu revuo. Krom tio, li kelkfoje havis respondecojn en la komitato de la grupo kaj dum ĉi kelkjara periodo rolis kiel Sekretario de **Astura Esperanta Asocio**, kaj gvidis kursojn de Esperanto en publikaj lernejoj de la urbo.

Sed lia efa aktivado disvolvis en la organizaj taskoj de nia E-grupo. Li estis nelacigebla laboranto de nia E-grupo. Kun la malperdo de Julio nia E-Asocio perdas iun el siaj plej aktivaj membroj; ke en la estonteco ne manku e ni tiaspecaj volontuloj favoraj al la Granda Ideo de Zamenhof. Al lia familio ni kondolencas kaj dankas pro la transdono al nia E-Asocio de la esperantista biblioteko de tiu samideano.

Per iu el la informiloj de AEA de la lasta periodo ni informis pri la vizito de gvidantinoj de **Madrida Esperanto-Liceo** al nia E-grupo, Lupe Sanz-Bueno kaj Carmen Suárez.

En 2005 MEL eldonis hispanlingvan biografion de L. L. Zamenhof verkitan de René Centassi kaj Henri Masson, kun prologo de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de la iniciatinto de Esperanto. La libro titolita *El hombre que desafió a Babel* (La homo kiu defiis Babelon).

Kiam, la 9an de novembro, vizitis nin Lupe Sanz-Bueno kaj Carmen Suárez, ili alportis kelkajn volumojn el tiu verko, kiujn nia E-Asocio akiris por sia biblioteko. Profitante la eeston de tiuj madridaj samideaninoj, membroj de **Astura Esperanta Asocio** akompanis ilin al la publika biblioteko de Gijón por donaci al tiu centro ekzempleron de la libro. La subaj fotoj de tiu paŭzo montras la viziton de la madridaj esperantistinoj al la sidejo de nia E-grupo kaj la akton de la transdono de la libro al la direktoro de la Publika Biblioteko "Jovellanos".

Kiel iujare okazas, ankaŭ en 2009 la esperantistaj grupoj de Asturio kunfestis la t. n. Zamenhofan Tagon. La tradicia kutimo en la esperant-

ista movado estas fari tiun feston en dato proksima al la 15a de decembro, naski dato de la iniciatinto de la internacia lingvo. En nia regiono, **Astura Esperanta Asocio** de Gijón kaj la **Grupo Esperantista ANTA EN** de Avilés festas kune, de antaŭ multaj jaroj, tiun memortagon, kaj la festado okazadas iujare alterne en unu kaj alia urbo. En la jaro 2009 estis la gesamideanoj de Avilés tiuj, kiuj devis organizi la aferon en ilia lo urbo. Geesperantistoj el Gijón kaj Avilés kunvenis kaj kunmanis en tiu lasta urbo la 13an de decembro de la pasinta jaro.

La komuna celo kiu kunvokas nin kunesti kaj kunmani en tiaj okazoj estas la zorgado kaj la intereso pri la promociado kaj disvastigado Internacia Lingvo **Esperanto**. Tio speciale sencas en tiu epoko kiam la laborado tiucele ne estas fruktodona pro la malfacilaj cirkonstancoj de la nuntempa socio. Nia movado devas alfronti tiun problemon por la progresado de Esperanto kaj ties Interna Ideo. Pri tio kaj aliaj aferoj rilate al nia E-movado interparolis la membroj de ambaŭ grupoj, kiuj, tamen, ne estis multnombraj pro la frosta, pluva kaj malvarma vetero de tiu decembra tago. Sed en la renkontiĝo de la geesperantistoj regis, kiel kutime, tiu etoso de amikeco kaj frateco kiu, en la lingvo kiun ni penas disvastigi nomiĝas "samideaneco".

Sekvan esperantistan feston, kiu devos okazi en Gijón jam en la nuna jaro 2010, estos organizata de nia E-Asocio. Estus konvene ke ni prikonsideru la eblecon organizi ĝin en sezono pli favora por la renkontiĝo.



Nia forpasinta samideano Julio Argüelles.



Vizito de gvidantinoj de MEL al nia sidejo kaj transdono de biografio de Zamenhof al la Biblioteko de Gijón



Esperantista festotago 2009 en Avilés

La i-jara Asembleo de nia Esperantista Asocio estis duobla. La statute, en i tiu kvara jaro post la elektado de la estraro de la Asocio, oni devis fari, krom la Ordinara, ĝenerala Asembleo, anka alian Eksterordinaran por (re)elektadon de la asocia gvidantaro. Komence oni planis amba asembleojn por la 1an de marto, sed poste en tiu tago okazis nur la Ordinara Asembleo kaj oni decidis prokrastigi la Eksterordinaran por la 17a de la sama monato.

En la asembleo de la 1a de marto, post la tralegado kaj aprobo de la akto de la pasintjara

Asembleo, oni informis pri la agado de la Asocio dum la jara periodo pasinta ekde la anta asembleo. Oni informis pri la malsukceso de la demarĉoj celante organizi kurson de Esperanto en la pasinta lernojaro kaj oni prikonsideris proponojn por alfronti tiun problemon en la sekvaj jaroj.

Pri la jara kotizo al la Asocio oni decidis ke la kvanto de tiu kotizo da re estu 17 e roj iujare.

La Prezidanto Carlos Enrique Carleos informis pri eblaj anoj en la situacio de la konstruaĵo de la **Katedro Jovellanos de Universitata Disvastigado**, en kiu estas enkadrigita nia Esperantista Asocio kaj kie ni disponas je granda, bela kaj komfortaejo por nia esperantista laboro. La eblaj anoj, kiuj povas efiki kontraŭ ni, konsistas en tio ke la urbestro de Gijón inter alia kun la Universitato de Oviedo tiun konstruaĵon de la strato Tomás y Valiente, kie troviĝas nun ĝia sidejo, per alia nova konstruaĵo kiun oni devas fari en la Universitata Areo (Campus) de Viesques. La malfavora por ni efiko de tiu nova konstruaĵo estas tiu ke ni restas subriske ke en la nova domo de la Katedro, kvankam oni asignu al ni iun ejon, ĝi ne tiel estu bona kiel la nuna. Krome, la fakto mem ke la nova loko de la Katedro, kaj nia ejo ene de ĝi, troviĝos for de la urbo kaj ne en la urba

centro mem, kiel okazas nun, damaŭ, pro la distanco, la okazadon de eblaj E-kursoj, kiujn oni povus fari tiam. Rilate al tio, estis interkonsento inter la ĉeestantaj membroj de la Asocio, ke ĉiukaze konvenas al ni konservi nian rilaton kun la Universitata Katedro, kaj se, okaze de organizado de E-Kurso, eblos trovi por la klasoj ejon en la urbo des pli bone, kaj se ne, kiel lasta ebleco restus al ni la loko kiun oni asignus al ni en la nova domo de la Katedro.

Santiago Mulas, Honora Prezidanto de la Asocio, informis ke merkrede, la 17an de tiu monato, la

saman tagon fiksitan por la Eksterordinara Asembleo, vizitos nian E-grupon la esperantista geparo Luis Hernández kaj Rafaela Urueña, el Valladolid. Ni bone konas tiujn elstarajn geesperantistojn de nia lando kiuj, de anta multaj jaroj, tre bone rilatas kun nia Gijona E-grupo: En la jaro 1979, kiam okazis la **Hispana Kongreso de Esperanto** en Gijón, S-ino Rafaela Urueña estis Prezidentino de **HEF**, kaj ŝia edzo estis la



Nuna domo de la Katedro "Jovellanos", kie troviĝas ankaŭ la sidejo de nia E-Asocio.

Sekretario; ili tre kunlaboris kun la loka komitato de Gijón en la organizado kaj realigado de tiu landa kongreso. Kaj kelkajn jarojn poste, kiam okazis en Gijón la **3a Astura Kongreso de Esperanto**, ili partoprenis en tiu renkontiĵo.

Kiel planite, la 17a de marto okazis la Eksterordinara Asembleo de nia Asocio kaj dum ĝi akompanis nin, la anoncinte, Doktorino Rafaela Urueña Álvarez, Profesorino pri Internacia Juro en la Universitato de Valladolid, kaj ties edzo Luis Hernández García.

La Asembleo normale disvolvis kaj procedis al la elektado de la nova estraro de **Astura Esperanta Asocio**, sed, fakte, la elektita estraro ne multe estis nova ĉar la efaj respondecoj kaj funkcioj de la Asocia komitato estis asignitaj al, kaj akceptitaj de, la samaj personoj kiuj realigis ilin ĝis nun.

Sed, kiel ni jam raportis en la 8a numero de AEA-Infomilo, estis tre profita kaj agrabla la renkonti o kun la Valladolidaj gesamideanoj. La membroj de nia Asocio partoprenintaj la Asembleon havis okazon inter an i kun la gevizitantojn ideojn kaj prikonsiderojn rilate al la aktivado en la esperantista movado kaj la malfacila oj kiujn tiu laboro renkontas nuntempe en la socio.

Ili informis al ni pri iu esperantista aran o en la sidejo de Sorio de la Universitato de Valladolid: la aran o, organizita kaj gvidita de Profesoro Juan Miguel Zarandona de la Universitato de Valladolid, titolis **Esperanto kaj tradukado: Utopio kaj realo**. Tiu titolo estis en la hispana lingvo ar temis pri kurso por neesperantistaj licenciuloj de tiu centro. Ili transdonis al ni, por ke ni disdonu ilin al publikaj bibliotekoj kaj aliaj klerigaj centroj de nia urbo, kelkajn ekzemplerojn de porkomputilaj diskoj kiuj prezentas prelegojn de profesoroj kaj anka labora ojn de la studentoj de tiu kurso. La disko apartenas al la serio de la elektronika biblioteko de la Deputitejo de Sorio.


ia enhavo estas PDF-formata teksto en kiu enestas la efaj prelegoj kaj kontribuoj de la kurso, inter ili ties de Rafaela Urueña: *La rolo de Esperanto en la defendo de la lingva diverseco*, kaj de Luis Hernández: *Esperanto, fundamenta elemento por la universala kulturo*.

Iuj el la labora oj kiuj konstituas la diskan tekston estas interesaj temoj pritraktitaj de la gelernantoj mem de la kurso: *esto de Esperanto en la kino, Argumentoj favore al kaj kontra Esperanto, La literaturo en Esperanto, Etimologio de la esperanta leksikaro...* En i tiu numero de Heleco ni recenzas tiun materialon.

Kadre de tiu i raportado pri la esperantista vivo de nia E-grupo mencioblas la E-agado de la sekretario de nia Asocio, Faustino Castaño, okaze de sia vizito al Madrido meze de monato aprilo. La 12an de tiu monato li vizitis la ejon de **Madrida Esperanto-Liceo** kaj intervendi is tie kun kelkaj membroj de tiu E-rondo, inter ili samideano Lupe Sanz-Bueno, kiu vizitis nia E-grupon anta kelkaj monatoj, kaj samideano Pedro A. Zurita, pri kiu raportis iu numero de nia AEA-Infomilo okaze de renkonti o kiun li havis en nia regiono kun Carlos E. Carleos, la Prezidanto de AEA.

La gesamideanoj de MEL informis al la sekretario de AEA ke post du tagojn, la 14an de aprilo, okazos en la ejo de la Madrida Klubo pri Belarto (Círculo de Bellas Artes), publika legado de la Ki oto kaj invitis lin legi tiu-okaze fragmenton en Esperanto.


Tion akceptinte, nia astura samideano aliris tiutage kun aliaj madridaj geesperantistoj al la loko de tiu publika akto, en la strato Alcalá. Tie estis faritaj la subaj fotoj kaj ties de la sekva pa o.



Hispanlingva PDF-formata dokumento en disko kun materialoj de la kurso pri Esperanto por licenciuloj gvidita de Juan M. Zarandona en la Soria areo de la Universitato de Valladolid.



Gesperantistoj en la sidejo de la Madrida Klubo pri Belarto



Legado de la *Kioto* en Esperanto en la Madrida Klubo pri Belarto

Estis multenombra publiko en la salono de la legado de la *Kioto*. La legado estis en la hispana lingvo, inter la multaj personoj kiuj tralegis fragmenton de la fama novelo de Cervanto estis iu alta funkciulo de la ambasadejo de *ilio*. Estis ankaŭ grupoj apartenantaj al lernejoj, kiuj faris la legadon po-grupe, kvazaŭ teatr-ludante. La madridaj gesamideanoj demaris por ke oni permesu legi iujn fragmentojn en Esperanto kaj oni konsentis al ili ke estu du legantoj en la internacia lingvo. La interakordo de la estantaj gesperantistoj oni decidis ke la legantoj estu Faus-

tino Castaño kaj Miguel Fernández. Pri la interveno de ambaŭ samideanoj estas informo, e filmo, en la retpaĝoj:

<http://www.ipernity.com/doc/mpancorbo/7916133>

<http://www.ipernity.com/doc/mpancorbo/7916134>

<http://www.youtube.com/watch?v=k8o4gqcjvQU>

<http://www.youtube.com/watch?v=dhJfdOB9C0Y>

Fina esperantista akto de la sekretario de nia grupo estis lia eesto en la publika prezentado de hispana traduko de esperantilingva verko de A. Marco Botella: **Kronikoj de la esperantista laborista movado.**



Gesperantistoj en la sidejo de la Madrida Klubo pri Belarto



INFORMOJ PRI HESPERANTOJ

Esperanta Vikipedio kun pli ol 450.000 artikoloj

En e ne du monatoj WikiTrans tradukis 300.000 artikolojn de la angla Vikipedio al surprize bona, e se ne senpeka Esperanto. Post jaro oni probable atingos tri milionojn.

La WikiTrans-projekto estas esplor- kaj evoluigo-projekto de la dana lingvoteknologio-firmao *GrammarSoft ApS [Eckhard Bick]*, kunlabore kun *University of Southern Denmark* (Suddana Universitato). La efa celo de la projekto estas permesi trans-lingvan uzadon de Vikipedio-artikoloj, pere de paralela tradukita retejo.

Unuavice la ideo estas oferti aliron al la plej granda Vikipedio de iuj - la angla, kun pli ol 3 milionoj da artikoloj - en Esperanto kaj la dana. Kvankam amba lingvoj estas inter la pli grandaj Vikipedioj, iliaj po ~ 130.000 artikoloj konsistigas nur modestan kolekton kompare al kio haveblas en la angla. Krome, la individuaj artikoloj estas ofte multe pli malgrandaj ol iliaj anglaj analogoj, malpli dense fontigitaj a simple t.n. ernoj.

Vi certe trovos ankora multajn aliajn pridiskutindajn aspektojn. Sed ajnas al mi klare, ke la tuta Vikipedia agado devas esti profunde repensita.

u nova prioritato ne devas esti korekti la tradukojn anstata mem ekverki? Kaj se oni originale ekverkas, u oni ne prioritato verku pri verdlandaj, esperantaj "nacia oj", kulturo ktp. ne troveblaj en la angla Vikipedio?

i tiu informo estis provizita de Miguel G. Adúriz. La sama temo estas pritraktata en la blogo de Bernhard Pabst, retadreso: <http://www.ipernity.com/blog/37943/248693> el kie ni prenis anka jenon:

Kio? u vere? u mi ne legas sur ia [efpa o](#), ke temus pri iom malpli ol 130.000 artikoloj komence de majo 2010? Jes, vi pravas. Kaj ne, vi ne pravas. Vi pensas pri la esperanta Esperanto-Vikipedio, sed mi parolas pri la angla Vikipedio a tomate tradukita al Esperanto per [WikiTrans](#). ...

Jes ja, temas pri tradukoj, ne senmakulaj a seneraraj, sed surprize bonaj. Se vi interesi as, simple iom ludetu per [WikiTrans](#). Jen la [angla elefanto tradukita al Esperanto](#), jen la [esperanta elefanto](#). Jen [tradukita Londono](#), jen la [originale esperanta Londono](#), jen la detala [kontra varma ildo \(heat shield\)](#), jen la [magra samtitola](#), ktp.

Jes ja, kompreneble anka ekzistas inversaj kazoj, nome artikoloj, kie la esperanta originalo estas enhance pli detala kaj profunda, vd. ekzemple la tekston pri la [esperanta Gaston Waringhien](#) kaj tiu [tradukita](#) el la angla. Kaj, jes ja, ekzistas kazoj, kie en la angla Vikipedio tute mankas artikoloj troveblaj en la esperanta (ekzemple pri la germana Esperanto-vortaristo [Max Butin](#)).

Vi certe trovos ankora multajn aliajn pridiskutindajn aspektojn. Sed ajnas al mi klare, ke la tuta Vikipedia agado devas esti profunde repensiigita. u nova prioritato ne devas esti korekti la tradukojn anstata mem ekverki? Kaj se oni originale ekverkas, u oni ne prioritato verku pri verdlandaj, esperantaj "nacia oj", kulturo ktp. ne troveblaj en la angla Vikipedio?

Kaj plia informo en la propra retpa o de [WikiTrans](#) :

Bonvenon al la Esperanta sekcio de WikiTrans. i tie vi povas ser i en esperantlingva versio de la angla Vikipedio, komence kovrante la 100000 plej uzatajn artikolojn, sed balda inter pli ol 3 milionoj da artikoloj. WikiTrans trovas ser esprimojn ne nur kiel kapvortojn, sed anka ene de artikolo, kaj tial unue montros al vi pa on kun ordigitaj trovoj, la ver ajneco, por disambiguigo.


WikiTrans tradukoj estas altkvalitaj ma intradukoj, uzantaj regul-bazitan sistemon, [GramTrans](#), kiu kombinas profundan lingvistikan analizon ([Constraint Grammar](#)) kun kontekstdependaj tradukreguloj. Kaj la da ra evoluigo de la MT-sistemo kaj la fakto ke Vikipedio-artikoloj konstante estas aktualigataj, necesigas laborplanon kun regulaj isdatigoj. Tiel novaj artikoloj traduki as post apero, kaj malnovaj tradukoj refari as en intervaloj de kelkaj monatoj.

ar e multaj originalaj Vikipedio-artikoloj en malgrandaj lingvoj krei as parte per tradukoj a almena inspiri as per artikoloj en pli granda lingvo, a tomata tradukado devus faciligi la laboron de Vikipedio-a toroj kiuj strebas mallar igi la kvantan kaj kvalitan distancon inter siaj lingvoj kaj la angla ef-Vikipedio.

En la tradukita materialo de la WikiTrans-retejo (do epo.wikitrans.net por Esperanto), eblas paralele ser i kaj la esperantan kaj la anglan kapvortojn. Aldone, la Lucene-bazita ser interfacio kapablas trovi - kaj ordigi - plentekstajn trafojn, ilustrante ilin per teksteroj. Disambiguado de plurobla kapvorto estas kromefiko de tio, kaj ne

necesas plusendo-pa oĵ por sekundaraj a sinonimaj esprimoj, kiujn plejparte facile trovas kaj religas jam la normala ser ilo.

La unua fazo de la WikiTrans-projekto okupiĝis pri la Esperanto-tradukado de la 100.000 plej ofte uzataj anglalingvaj artikoloj, kaj la unua tradukorondo kompletiĝis la 15-an de marto 2010. La aktuala dua fazo celas vastigi la unuan tradukrondon al 3 milionoj da artikoloj, kun paralela konstanta plibonigo de la traduksistemo. Sen reviziado a reverkado, WikiTrans-artikoloj kompreneble simple restas tradukoj, kaj kvankam ili ne estas cita oĵ en la strikta senco de la vorto, ili retenas la saman enhavon kaj a tureco-historion kiel la origina angla [Wikipedia](#) artikolo. Tial, bone-malbone, WikiTrans-artikolo elmontras la samajn fortojn kaj malfortojn, kvalitojn kaj erarojn kiel la originalo. Ankaŭ necesas atentigi, ke la tradukoprocezo mem foje enkondukas kelkajn ambigua oĵn a e erarojn. Kvankam tia oĵ estas maloftaj kaj kutime perkontekste travideblaj por la homa leganto, vi ĉiam trovos ligon al al originala artikolo tuj apude, por komparo.



Oni eldonis antaŭ kelkaj semajnoj la hispanlingvan version de la libro "Laboristaj kronikoj", verkita de Antonio Marco Botella, kaj publikigita en 1996 de SAT-Bro ŭrservo, kiu pritraktas la historion de la laborista esperanto movado en Hispanio, de la komenco ĝis tiu jaro. La nuna libro aperis sub la nomo **Crónicas del movimiento obrero esperantista**, kaj estas baze la sama libro, kun kelkaj aldonoj kaj malgranda ĝisdatigo, kaj en multe pli bonaspekta formato.

La granda merito kaj laboro pri la libro estas kompreneble de la aŭtoro, Antonio Marco, veterana pioniro el Zaragozo, kiu multe verkis pri historio, kaj kiu ankaŭ eĝolis en la disvolvo de nia movado en Hispanio. Antonio ne nur esploris la okazinta oĵn, rakontas pri siaj spertoj, verkis la originan libron, sed ankaŭ mem tradukis la tekston.

Duan sed tre gravan meriton oni devas aljuĝi al alia amiko, Pedro Sanz. Li faris tiun laboron de editorado, pri kiu ĉiam verkis Waringhien, tiel grava, kaj tiom malmulte agnoskita. Pedro kuraĝigis la tradukadon, poluris, serĉis fotojn, kaj fakte trapuĝis la aperigon de la verko. Ĉiam la demarĉoj por publikigo en eksteraj eldonejoj ne sukcesis estis la organizo kiun li nun prezidas, **SAT-en-Hispanio**, kiu devis zorgi pri tiu laboro. Estas bedaŭrinde ke la dankesprimojn de la enkonduko oni nur tradukis el la unua versio, sed ne ĝisdatigis, ĉar lia nomo devus nepre aperi tie.

Post tiuj du multhoraj kaj meritplenaj laboraroj, verkado+tradukado kaj editorado+eldonado, mankas tria ne malpli giganta: distribuado kaj vendado.

Fakte, eldoni estas nun tre facile. Mi surpriziĝis ke la fizika eldonado kostis multe malpli ol mi antaŭsupozis, konsiderante ke la kvalito de la fina produkto estas forme tre alloga, kontraste kun la antaŭa versio. Sed la problemo de distribuado estas la tubero kiu ĉi tiopas nian eldonadon. Se la libro estas internacia, la sendokostoj povas tute malhelpi la distribuadon, kaj tion mi nun spertas, ĉar mi ekesploris pri sendado de lerna materialo al kubaj esperantistoj, ene de la projekto **Esperanto al Ameriko**. Kaj se ĉi estas en tataro, mankas al ni la kanaloj por atingi la grandan eksteran publikon, kion fakte tiu ĉi libro certe meritas.

Do, jen la granda laboro kiun ni frontas, kaj kiun la idealistaj batalantoj tro ofte forgesas, pretervidas aŭ pri kiu ni malkompetentas. Ni devas prezenti la verkon, disanonci, informi, instigi kaj krei merkaton. Tro multaj libroj restas en keloj kaj skatoloj. Mi esperas ke ni (mi mem, sed mi esperas ke tiu ĉi alvoko tagu por aliaj) konsciu pri la graveco de tiu ĉi tasko.

Ĝuste tiun aferon de distribuado verĉajne ankaŭ la enkonduko de elektronikaj libroj. Mi sekvas kun scivolemo tiun ĉi evoluon, kaj ĉojas ke la debato (ĉe [Ipernity](#), [Libera Folio](#) aŭ [diversbloge](#)) kaj la unuaj iniciatoj ([FEL](#), [La Ondo de Esperanto](#)) alvenas jam ankaŭ al nia komunumo. Ĉi ja povas esti la solvo de tiuj problemoj kiujn mi menciis, kaj kiu tiel speciale afliktas nian komunumon, kaj mi esperas ke ni kapablos doni adekvatan solvon, kiu same kontentigos niajn aŭtorojn kaj niajn legantojn. Certe estos okazo por plu diskuti.

Tonyo del Barrio

Historio de AEA en Heleco

La anta a numero de nia revuo estis publikigita en a gusto de la pasinta jaro. Tial ke 2009 estis la Centjara Jubileo de **Astura Esperanta Asocio**, tiu revua numero estis efede dedi ita al la historio de la E-Asocio kaj de la esperatismo en nia urbo kaj ĝenerale en Asturio.

Kompreneble, la raportado pri tiel longa periodo, kiu en la revuo ampleksis ne malpli ol 81 paĝojn, postulis, krom ega laboro de verkado, ankaŭ dedi ito al la esplorado de la troveblaj dokumentoj, de la E-Asocio, de tuta jarcento.

La kolektado de dokumentaro apartenanta al tiel vasta tempo-darostis relative facila en kio rilatas al iuj epokoj, efela lastaj, de la historio de nia E-grupo, sed tre malfacila por aliaj epokoj. Ekde la jaro 1954, kiam post la landa civil-milito kaj la malfavora por nia E-movado unua etapo de la postmilito, la esperantismo renaskiĝis en Gijón, la dokumentaro estas relative abunda. Ni disponas de leter-arkivo kaj aktlibro de la **Esperantista Grupo Jovellanos**, kiuj detale informas pri la esperantista agado en nia urbo dum tiuj jardekoj. Poste la informo-fontoj ebligandiĝis per la komencio de la eldonado de **Heleco**. Sed en kio koncernas al la unua **Astura Esperanta Asocio**, fondita en la jaro 1909 kaj gvidita, ĉi tiu civil-milito, de Francisco Menéndez Rúa, ni disponis nur je pluraj fotoj kaj la disaj informoj kiujn ni povis eltiri el la verko de Antonio Marco Botella: **Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo**.

Post la eldonado de tiu 84a numero de revuo kaj ties apero en la interreta paĝo de nia E-Asocio, baldaŭ ni ricevis mesaĝon el iu hispana samideano, Juan Azcuénaga. Li, temante pri la historia raporto de **AEA**, diris ke por la komenca epoko de la vivo de tiu E-rondo ni ne profitis la informon kiun oni povas eltiri el la interreta hemeroteko de tiuepokaj asturaj urnaloj.

Tiu aserto ege surprizigis nin ĉar ni sciis nenion pri la ekzistado de tia interreta hemeroteko de antikvaj urnaloj de nia regiono. Samideano Azcuénaga komunikis la ni la retadreson de tiu hemeroteko: <http://hemeroteca.gijon.es/> kaj ni povis konstati ke, jes ja, en tiu retpaĝo estas trovebla la kompleta kolekto de multaj antikvaj urnaloj de Asturio, ekde ilia fondiĝo ĉi tiu civil-milito. Kaj tre grave kaj interese por ni: en kelkaj el tiuj urnaloj, kiel *El Comercio*, *Avance*, *Noroeste*... de tempo al tempo aperis anoncoj, komunikaĵoj kaj informoj

de **Astura Esperanta Asocio**: asembleoj de la membraro, kunvenoj de la estraro, komencio de kursoj, anonco de ekzamenoj... Tiele ni povis konstati ke dum tiuj jaroj, de 1909 al 1936, la Esperanta Asocio bone kaj regule funkciadis kaj estis konstanta rolanto de la kultura vivo de la urbo en epoko kiam la kulturaj asocioj ne tiel abundis kiel nuntempe. Pri tio atestas la presaro mem ĉar se tiuj informoj dediĝis sian atenton al aferoj kiel la kunsidoj de la estraro de **AEA** tio signifas ke tiam ne abundis tiutipa informo. En la nuna tempo, kiam tiom da tiutipaj grupoj kaj asocioj ekzistas en nia urbo estas nepenseble simila atento al la kunsidoj kaj asembleoj de nia esperantista rondo nek de multaj aliaj kolektivoj.

En la sekva paĝo ni prezentas ekzemplon de iu el tiuepokaj urnalaj informoj pri nia gijona esperantista kolektivo. Por tiuj el niaj fremdaj legantoj, kiuj ne konas la hispanan lingvon, jen ni esperantigas tiun tekston:

En la Kunveno okazinta la 8an i-monate estis unu- anime aprobitaj la kontoj pri en- kaj el-spezoj.

Oni informis pri la tuta oficiala dokumentaro kaj la faritaj laboraĵoj dum la jaro pro la esperantista Kongreso laste okazinta en Asturio, unuanime decidante plenaprobi kaj danki al la estraro.

Oni decidis registri en la akto profundan senton pro la forpaso de Sro Ludoviko Cienfuegos Bernaldo de Quirós, grafo de Cienfuegos, entuziasma favorinto de A. E. A.

Sekve oni faris elektadon de la nova estraro, rezultante unuanime aprobita jenan liston:

Prezidanto, Sro Francisco Menéndez Rúa; vicprezidanto, Sro Alberto Menéndez González; ĝenerala sekretario, Sro Fernando Garcia de la Roza; sekretario Sro Alfredo Alvarez Casuso; administranto, Sro José Blanco Raspal. Vo donantoj: la eminenta doktoro Calisto do Rato y Rocés, Sro Joaquín González, presbitero; Sro Juan Antonio Zarracina; Sro Enrique Mengol Girona; Sro Salvador García García, kaj Sro Adolfo Morí Fernández.

Post kelkaj vortoj de la prezidento dankante nome de iuj pro ilia elekto, la prezidantoj kaj sekretarioj de la akademaj sekcioj informis pri la studoj faritaj dum la jaro, efela tiu de Historio pro la notoj rilate al la dua serio de la episkopoj de la Asturia Princlando kaj esploro de la unua, krom la listo kaj cirkonstancoj de iuj princoj de Asturio.

Krom tio oni legis kelkajn astronomiajn, muzikajn, elektrajn kaj fizikajn kalkulojn, kiuj vekis ĝian atenton pro ilia speciala originaleco.

ASTURA ESPERANTA ASOCIO

En la Junta celebrada el día 8 del corriente se aprobaron, por unanimidad, las cuentas de ingresos y gastos. Se dio cuenta de toda la documentación oficial y de los trabajos realizados durante el año con motivo del Congreso esperantista celebrado en Asturias, acordándose por unanimidad un voto de plena confianza y agradecimiento a la Junta de gobierno.

Se acordó hacer constar en el acta el sentimiento más profundo por el fallecimiento de don Luis Cienfuegos Bernaldo de Quirós, conde de Cienfuegos, entusiasta favorecedor de A. E. A.

Se procedió a la elección de la nueva Junta de gobierno, resultando elegida por unanimidad la siguiente: Presidente, don Francisco Menéndez Rúa; vicepresidente, don Alberto Menéndez González; secretario general, don Fernando Garcia de la Roza; secretario don Alfredo Alvarez Casuso; administrador, don José Blanco Rascal. Consejeros: Ilustrísimo señor doctor don Calisto do Rato y Roces, don Joaquín González, presbítero; don Juan Antonio Zarracina; don Enrique Mengol Girona; don Salvador García García, y don Adolfo Morí Fernández.

Después de algunas palabras del señor presidente dando las gracias en nombre de todos por su elección, los presidentes y secretarios de las secciones académicas dieron cuenta de los estudios realizados durante el año, destacándose el de Historia por los apuntes referentes a la segunda serie de los obispos del Principado de Asturias e investigación de la primera, más la relación y circunstancias de todos los príncipes de Asturias.

También se leyeron: algunos cálculos astronómicos, musicales, eléctricos y físicos que llamaron la atención por su especial originalidad.

Se terminó la sesión dedicando el presidente algunos recuerdos a los antiguos esperantistas gijoneses que compartieron con él los sacrificios de aquellos tiempos (1889-1904) llamados heroicos por las grandes dificultades que se oponían al avance del esperantismo, haciendo especial mención de don Justo del Castillo cuyo retrato se ostenta en sitio preferente del salón de sesiones.

Fini is la sesio dedi ante la prezidanto kelkajn vortojn memore al la antikvaj gijonaj esperantistoj kiuj kunhavis kun li la penojn de tiu epoko (1889-1904) taksitaj kiel heroajn pro la grandaj malfacila oj kiuj sin oponis al la progresado de la esperantismo, farante specialan mencion de Sro Justo del Castillo kies portreto montri as en elstara loko de la sesio-salono.

La esperantista kongreso, okazinta en Asturio, menciita en tiu noto estis la **8a Hispana Kongreso de Esperanto**, kiu okazis en Oviedo en septembro de la jaro 1929, pri kiu estas detala raporto en la historio publikigita en la anta a numero de **Heleco**. La noto provizas al ni kelkajn interesajn informojn pri la vivo de **AEA** en tiu epoko. Dank'al ni povis ekscii ke en tiu tempo Alberto Menéndez jam rolis kiel vicprezidanto de la Asocio. Li, kune kun Alfredo Villa, entreprenis, post la civilmilito, la taskon revivigi la esperantismen en Gijón. Alia grava, kaj kurioza, informo de tiu noto estas tio ke en la estraro de la Asocio elektita tiujare estis iu grava doktoro kuracisto de nia urbo kaj anka iu pastro. Menciindas anka la kulturaj taskoj entreprenitaj de la esperantista Asocio; la noto mencias historiajn kaj sciencajn studojn kaj labora ojn... Sed plej grave, por ni, el la tuta informo provizita de tiu noto estis tiu lasta paragrafo pri la memoro de antikvaj esperantistoj de nia urbo kiuj strebis por Esperanto jam en la periodo 1889-1904. Tio estis tute nova por ni; se

en Gijón jam estis por Esperanta laboro en la jaro 1889 tio signifas ke nia urbo trovi as inter la unuaj en la mondo labori favore al ideo kiu estis lan ita nur du jarojn anta e, t.e. en la jaro 1887, kiu estas konsiderata la oficiala prezentado de **Esperanto** fare de Dro Zamenhof. Konsiderante tion, la Centjaro de **Esperanto** en Gijón kaj Asturio devus esti konsiderata ne en la jaro 2009 sed en 1989. Nu, ni sciu ke la radikoj de la Internacia Lingvo en nia urbo estas pli profundaj ol ni mem pensis, kaj tio devas instigi nin senlace konservi tiun tradicion is la kompleta venko de la esperantista ideo.

Krom la transkribita noto el antikva urnalo temanta pri nia esperantista afero, estas en la presara hemeroteko de nia regiono kelkdeko da similaj informoj, komunikoj, kunveno-kunvokoj... Sed inter tiu materialo ni trovis alian noton indan je nia speciala atento. Sur la sekva pa o ni prezentas ian foton; tiu eltrana o apartenas al la urnalo **La Prensa**, de marde, la 5an de decembro de la jaro 1929. Jen i tie ties E-traduko:

En la Urbodomo

La esperantista asembleo okazinta en la diman o.

Pasintdiman e okazis en la Urbodomo de Gijón la anoncita asembleo esperantista en kiu eestis multenombraj delegitaroj de la asturaj esperantistaj grupoj federitaj.

Aprobinte la kontoj de en- kaj el-spezoj, leginte la oficialan dokumentaron kaj reelektinte, unanime, la estraron de la Federacio, estis nomumita komisiono konstituita de Sroj Francisco Menéndez Rúa, Mariano Cantalapiedra, Alfredo Villa kaj Alberto Menéndez, por ke ili proponu la novan planon, kiu validos de la jaro 1930 kun ties fundamenta regularo kaj la interna regformo. Sro Jiménez Mora informis pri la kina prezentado de la aktoj de la esperantista Kongreso, kiu estos montrata en la sekvonta kunsido en Gijón.

Oni konsideras kiel fakton jam plenumitan ke la Asturia Princlando havos oficialan reprezentantaron pli ampleksan ol ties de iuj ceteraj hispanaj regionoj.

Anta en kaj anta en.

Vivu AsturPrinclando.

Kiel oni povas konstati, i-foje la kunsido ne estas de Astura Esperanta Asocio sed de la tuta Astura Esperantista Federacio, fondita kaj gvidita de Antonio Jiménez Mora, Federacio al kiu apartenis, krom AEA, ankaŭ aliaj grupoj de Esperanto ekzistantaj tiam en Asturio. La intereso de tiu noto estas tio ke ĉi montrasion, kion ĉi nun ni ne sciis. T.e. la kunlaboro, kadre de la Federacio, de la E-grupoj de la Laborista Ateneo de Gijón. Tiu kunlaboro reliefigas, en la noto, per la festo kaj kunelektado de Alfredo Villa, Prezidanto de la menciita grupo esperantista de la Laborista Ateneo, kune kun elstaraj membroj de Astura Esperanta Asocio, kiel Francisco Menéndez Rúa kaj Alberto Menéndez. Ni jam supozis ke estis sufiĉe bona rilato inter la E-grupoj de nia urbo el malsama ideologia inklino, konsiderante la postmilitan kunlaboron de anoj el tiuj malsamaj grupoj en la revivigo de la esperantismo en Gijón, sed ĉi nun ni ne havis informon certan pri vera kunlaborado, kiel montras kaj atestas la ĉi menciita noto kiun ni prikomentas nun.

En el Ayuntamiento

La asemblea esperantista celebrada el domingo

El domingo se celebró en la Casa Consistorial de Gijón la anunciada asemblea esperantista a la que asistieron numerosas representaciones de los grupos esperantistas asturianos federados.

Después de aprobarse las cuentas de ingresos y gastos, leerse la documentación oficial y reelegirse, por unanimidad la Directiva de la Federación, se nombró una comisión compuesta por don Francisco Menéndez Rúa, don Mariano Cantalapiedra, don Alfredo Villa y don Alberto Menéndez, para que propongan el nuevo plan que regirá desde primero de enero de 1930 con su fundamenta regularo y la internaregformo.

El señor Jiménez Mora informó acerca de la presentación cinematográfica de los actos del Congreso esperantista que en la próxima reunión en Gijón se expondrá.

Se considera como un hecho ya realizado el que el Principado de Asturias tendrá una representación oficial mayor que cualquiera otra región española.

Antauen kaj antauen,
¡Vivu Asturprinclando!

Resume, niaj legantoj interesitaj pri la historio de la Esperantistaj grupoj de Gijón konsideru nian raporton de la anta a numero de la revuo pli ampleksigita per tiuj- ĉi prezicigoj pri la anta milita etapo de tiu historio. Tiurilate tre utilis al ni, por la kono de tiu epoko, la informon, kiun ni dankas, de samideano Juan Azcuénaga pri la ekzistado de la presara hemeroteko de nia regiono.

Aliaj legantoj de la historia raporto kiun ni prikomentas esprimis alitipajn prikonsiderojn pri

raporto kaj pri la revuo

enerale. Ni devas menci

ĉi la konfuzon kiu okaz

igis al ni ĉi opinio ke tiu

raporto enhavas tro da

politika pritemo. La nia

opinio, la revuo, kaj kon

krete la historia raporto

havas nek troon nek

mankon, sed ustkvanton

da politika enhavo. La rap

porto estas historio kaj en

la historio estas politiko.

Estus tiel malfacile verki

la historion de Astura

Esperanta Asocio a de

Hispanio a de ĉi ajn, ne

meciante politikajn afer

ojn, kiel fari tiun verk

adon ne uzante la literon

“E”. La politiko estas ne

pra kompona o de la vivo

kaj de la ekzistanta real

a o, kaj per Esperanto oni

povas -kaj devas- pritrak

ti ĉi iujn ajn aspektojn de

la vivo kaj la reala o, kaj

la politiko estas unu el

ĉi, krome sufiĉe grava

kaj ofte influante kaj efi

kante sur la ceteraj.

Dum la jarcenta vivo de

Astura Esperanta Aso

ocio okazis du Mond

militoj, kaj tio influis tre

malfavore sur la esper

antista movado. Krome

en nia lando falis la mo

narkio en la jaro 1931,

kaj estis Respubliko, kaj estis fiaskinta revolucio en oktobro de la jaro 1934, kaj okazis civilmilito dum la jaroj 1936-1939, kaj ĉi, same ol la post-milito, kaj la malvarma milito mondscale, influis sufiĉe malfavore, sur la esperantista movado. Ĉi oni povas verki la historion de la esperantista movado de tiu jarcento ne menciante tiujn politikajn aferojn kun ĉi granda influo pri la E-movado mem?



i-jare, 2010, estas **Jakoba Jaro** a **Sankta Jaro** de la katedralo de la hispana urbo *Santiago de Compostela* (Sankta Jakobo de Kompostelo). Oni asignas tian titolon al la jaroj en kiuj la festo de tiu sanktulo –la 25a de julio– koincidas kun dimanĉo. Tio okazas ĉi-jare kaj ne okazos denove ĝis la jaro 2021. La pilgrimado al la sanktejo de Kompostelo estas speciale grava en tiuj Jakobaj Jaroj, kvankam ĉi, fakte, estas neniam kaj okazas ankaŭ en la ceteraj jaroj.

Tiu pilgrimado al Kompostelo, ne nur ekde nia lando sed ankaŭ ekde multaj aliaj landoj, eĉ el Okcidenta Eŭropo, okazadas jam de antaŭ pli ol jarmilo. Dum Mezepoko la pilgrimvojoj kaj la reto de ties diversaj branĉoj estis kvazaŭ fadenoj kiuj interligis la diversajn centrojn de la kristana Eŭropo. La pilgrimado kontribuis krei, artikigi kaj fortigi la komercajn itinerojn kaj la politikajn kaj kulturajn ligilojn inter la tiam formiĝantaj reĝlandoj de Okcidenta Eŭropo. Ni memoru ke dum Mezepoko Hispanio, la tuta Iberia Duoninsulo, estis batalkampoj de kontraŭfronto inter civilizacioj, kelkcenta militado inter la Kristana Eŭropo kaj la Islamismo. Samtempe ambaŭ civilizacioj kontraŭfrontiĝis ankaŭ en la alia ekstremo de la Mediteraneo, en Mezoriento, la **Sankta Lando** de la kristanoj. Tie okazadis la t.n. krucmilitoj kontraŭ la islamanoj. En tiu kunteksto la religia centro de Kompostelo, la tiea kulto al la apostolo Sankta Jakobo kaj la intensa pilgrimado tra **Jakoba Vojo**, same ol la samtempa pilgrimado al Jerusalemo, rolis kiel ideologia elemento de kultura memfirmigo de la komuna identeco de la kristanaj, eŭropaj, popoloj.

La intercivizacia milito rezultis malsame en ambaŭ ekstremoj de la Mediteraneo. En Oriento la kristanaj kruckavaliroj estis forbalaitaj de la muzulmanoj. Poste estiĝis tie forta turka imperio kiu detruis la Bizancan imperion kaj minacis Orientan Eŭropon en ofensivo kiu etendiĝis tra la Balkana regiono ĝis Centra Eŭropo. Dume en Okcidento la kristanaj regnoj de la Iberia Duoninsulo (Kastilio, Aragono, Portugalio...) forpelis la islamanojn kaj detruis ĉi-ties kulturon en ĉi tiu teritorio.

Rezulte de tiu ŝanĝo de la situacio, post la 15a jarcento iome perdis viglon tiu pilgrimado al Kompostelo. Menciindas ke krome estiĝis interne de la kristana Eŭropo la grava skismo kiun konstituis la t.n. **Protestanta Reformacio**. En la sekvintaj jarcentoj la pilgrimoj tra la Jakoba Vojo neniam reakiris sian mezepokan brilon. Sed ajnas ke lasttempe denove plivigliĝas tiu fluo. Ĉu tiu fenomeno iome rilatas al la reformiĝo de la intereŭropaj ligiloj ene de la formiĝanta **Eŭropa Unio** kaj al la fantomo de nova intercivizacia kontraŭfronto kiu sin insinuas en la horizonto?

iukaze, jen nun estas konvena okazo por ke ni dediĝu iun historian rigardon al la epoko kaj cirkonstancoj en kiuj naskiĝis la Jakoba kulto kaj pilgrimado, la tiamaj religiaj, politikaj kaj sociekonomiaj kondiĉoj, la Jakoba Vojo kaj ties religia kaj kultura signifo, la arkitekturo kiu karakterigis tiun epokon... La sekvaj paĝoj estas dediĉitaj al tiu studo.



Apostolo Sankta Jakobo

LA LEGENDO



Temante pri la origino de la kulto al la Apostolo Sankta Jakobo en Kompostelo, pli ŝuste ol pri “legendo” ni povus temi pri “legendoj”, plurale, ĉar estas kelkaj en rilato kun ĉi tiu afero.

